



PROF. MAURICE F R E C H E T

(1878 - 1973)

*Prof. Maurice Fréchet (Moris Fréchet) estis prezidanto de la unua Estraro de la restarigita (post la Dua Mondmilito) ISAE (1950-1953; antaŭ tio funkciis la provizora Estraro). Pro tio ni petis nian novan membron Prof. G. Kurepa fari nelongan nekrologon pri M.F., kaj li aŭfable faris ĝin por niaj legantoj.*

La franca mondfama matematikisto M.F. naskiĝis 02.09.1878. en *Maillygny* (departemento *Yonne*) kiel la kvara el ses infanoj; mortis en Parizo 04.06.1973. La mezlernejon, altajn studojn kaj matematikajn doktorajn studojn li finis en Parizo. Li prelegis en la liceo de *Besançon* (*Nantes*), kaj la fakultatan karieron komencis en *Rennes* (1909), daŭrigis en *Poitiers* (1910-1918), *Strassbourg* (1919-20) kaj finis en Parizo. En *Poitiers* li prelegis matematikon, en *Strassbourg* superan analizon kaj statistikon, en Parizo la probablekteorion.

Rerigarde al siaj verkoj *Fréchet* plurfoje emfazis kiel sian idealon la pensojn de *Leibnitz*: "Tiuj kiuj ŝatas esplori detalojn en sciencoj malestimas abstraktajn kaj ĝeneralajn esplorojn, kaj tiuj kiuj profundigas principojn eniras malofte la detalojn. Kio min koncernas, mi aprezas egale tion kaj alion, ĉar mi trovis ke analizo de principoj servas al evoluo de apartaj esploroj." Tiuj dialektikaj pensoj pri kunligo de aparta kun ĝenerala, praktika kun teoria, troviĝas en la verkado de *Fréchet*.

En sia longa vivo, M.F. verkis en pluraj matematikaj kampoj. La plej gravan kontribuon li donis en la Ĝenerala topologio kaj en la Ĝenerala analizo. Li mem rigardis ĝeneralan aŭ arecan topologion kiel enkondukan ĉapitron de la ĝenerala analizo, t.e. en la matematikan parton pri traktanta organizaĵojn kaj kunligojn inter tiaj organizaĵoj, aparte inter "topologiaj spacoj". Li ekvidis ke oni povas konstati tre multajn ecojn pri realaj transformoj kun realaj variabloj eĉ tiam kiam la variabloj ne estas nepre nombroj aŭ kurboj sed membroj de ajna tutaĵo en kiu ekzistas iuj elementoj de organiziteco.

Tiel li trovis siajn metrikajn spacojn, poste ankaŭ ĝeneralajn ĉirkaŭaĵajn spacojn, sur kiuj fondiĝis la Ĝenerala analizo kaj M.F. atin-



gis mondan famecon. Estas konataj difinoj de *Fréchet* pri dimensio, diferencialo, para-analitikaj funkcioj, kaj oni parolas pri spacoj, kurboj, surfacoj de Freŝe, distanco de Freŝe inter kurboj, surfacoj ktp.

M.F. havis siajn disĉiplojn kaj sekvantaron en multaj ŝtatoj. Li havis ankaŭ la rekonojn, pli en eksterlando ol en Francio mem. Jam en la jaro 1929. oni elektis lin regula membro de la Pollanda Akademio de Sciencoj; por membro de la Franca Akademio de Sciencoj oni elektis lin nur en 1956. Li estis adepto de Esperanto kaj prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista dum tri jaroj, en la komenca periodo kiam oni la duan fojon refondis la Asocion (post ĉesigo de la laboro dum la Dua Mondmilito).

Lian malrapidan altiĝon en la universitata kariero kaj la malrapidan rekonon en Francio oni devas verŝajne klarigi per tio ke li aliris novan vojon en matematiko, ekster la klasika kadro de matematiko, havanta tiam en Francio mondkonatajn reprezentantojn. En Francio oni komencis estimi M.F. tiam kiam liaj ideoj havis jam fortajn radikojn en Germanio, Usono, Pollando, Sovetio ktp.

M.F. estis fruktodona verkisto kaj bona organizanto. Li verkis pli ol 370 artikolojn, broŝurojn, librojn ....., en la franca, angla kaj Esperanto. Li multe vojaĝis kaj prelegis en diversaj ŝtatoj. En Jugoslavio li estis kvarfoje (1934, 1953, 1954 kaj 1956) - aparte menciinda la vizito el 1953., kiam li faris plurajn prelegojn el siaj matematikaj esploroj.

Mi havis la feliĉon kaj agrablon esti dum specialistiĝo en Parizo kaj tie labori kun *Fréchet* kaj doktoriĝi sub lia gvidado.

*Ĝuro Kurepa*